BULTENO
DE LA INTERNACIA LABOR-OFICEJO

No 7 Februaro 1924
Aperas ĉiudumonate kiel aldono al „ESPERANTO“ ☆ Redaktejo: BUREAU INTERNATIONAL DU TRAVAIL, GENÈVE

**TEKSTO:** *Dudekunua Kunsido de la Administra Konsilantaro. — La enketo pri produktado. — La Sepa Kunsido de la Internacia Labora Konferenco. — La Senlaboruloj de la Mondo. Statistikoj de la Internacia Labora Oficejo. — Simpligo de la dungo de sezona eksterlanda laboristaro. — Pollando kaj la Internacia Labora Organizajo. — La Internacia Labora Oficejo kaj la maraj laborkondiĉoj. La klopodado de la Komuna Mara Komisiono. — Tutmonda prezaltiĝo. — Asekuro kontraŭ senlaboreco. Novaj Projektoj en diversaj landoj. — Laboraj Juĝistaroj en Ĉe.oslovakio.*

## Dudekunua Kunsido de la Administra Konsilantaro.

La Administra Konsilantaro kunvenis la 29an de januaro en Genève. En la malferma kunsido la prezidanto salutis F-inon Margaret Bondfield, Parlamentan Sekretarion de la Ministrejo de Laboro, la novan delegiton de la Brita Registaro kaj D-ron Feig, kiu sekvas D-ron Leymann, kiel reprezentanto de la Germana Registaro.

La Konsilantaro ekzamenis la Raporton de la Direktoro pri la klopodado de la Oficejo dum la lastaj monatoj. Sekve ĝi diskutadis la nunan situacion rilatan al la konfirmo de la Projektoj de Konvencioj balotitaj de la Internacia Labora Konferenco. Ĝis nun 92 konfirmoj de konvencioj estas formale registritaj. Krom tio, la reprezentanto de la pola registaro sciigis siajn kolegojn pri la lasttempa konfirmo de dektri konvencioj flanke de la kompetentaj aŭtoritatoj de sia lando. La itala registara delegito ankaŭ preanoncis la baldaŭan konfirmon flanke de Italio de ĉiuj konvencioj, kun escepto de tiu pri la okhora labortago, kiu estas proponita al la Parlamento.

La Administra Konsilantaro notis la raporton preparatan de la Oficejo pri la aplikado en ĉiuj landoj de la principo de libera asociado, principe konsekrita de la parto XIII de la Packontrakto. Ĝi komisiis al la direktoro daŭrigi la preparon de la raporto.

La Konsilantaro dediĉis du kunsidojn al la demando pri la konfirmo de la Konvencioj, kaj precipe la Konvencio balotita en Washington pri la okhora labortago kaj la kvardekokhora laborsemajno.

La Konsilantaro unuanime invitis la direktoron fari senĉesan klopodadon por certigi la konfirmon de la diversaj Konvencioj.

La reprezentanto de la francaj mastroj apogis la proponitan agadon favore al konfirmo ĝenerale, sed montris, ke la okhora labortago estis forlasita en Germanlando, kaj ke la motivo pretekstata por la plidaŭrigo de la labortago, estas la neceso pliigi produktadon por pagi la rebonigojn. Li aldonis, ke, konsiderante la deklarojn faritajn, kaj tute lasttempe faritajn flanke de personoj aŭtoritatplenaj, kaj precipe de la Prezidanto de la Reichstag, kiu en la lastaj tagoj deklaris la volon de Germanlando pagi rebonigojn, ŝajnis al li malfacile malpermesi la germanan popolon labori unu aŭ du ekstrajn horojn, se tiu aldona klopodo ebligus Germanlandon plenumi ĝiajn devojn.

La Germana mastra delegito diris, ke, laŭ lia opinio, Germanlando devas, por plenumi ĝiajn devojn, unue ŝpari kaj sekve, labori pli intense, kaj ke la plidaŭrigo de laborhoroj celas ekskluzive la pagon de rebonigoj. Plue, la germanaj mastroj konsideras, ke la rimedo estas nur kelkatempa, necesigita de esceptaj cirkonstancoj, kaj devas ĉesi, kiam tiuj cirkonstancoj ĉesas.

La germana laborista delegito diris, ke la demando pri la okhora labortago konsistigas nuntempe la fokuson de ĉiuj sociaj interesoj en Eŭropo. Laŭ lia opinio, estas neimageble, ke la Administra Konsilantaro povas permesi iun ajn disputon pri la principo de la okhora labortago, principo unuanime proklamita en Washington de la Registaroj, majstroj kaj laboristoj de la tuta mondo. Li rememorigis, ke la germanaj laboristoj, pli ol iuj aliaj klasoj, konstante deklaris ilian volon pagi rebonigojn. Ili ne povus tamen konsenti, ke la tuta ŝarĝo de la rebonigoj estu metita sur la ŝultroj de la germanaj laborantoj. Se estas necese pliigi produktadon en Germanlando, ekzistas aliaj rimedoj pli efikaj ol la plidaŭrigo de la laborhoroj.

La reprezentanto de la germana registaro apogis la opinion, ke la pago de rebonigoj estas intime kunigita kun la plidaŭrigo de la labortago. Germanlando, li diris, havas nur unu rimedon por certigi ĝian restarigon kaj liberecon: ĝi devas labori pli intense. La plidaŭrigo de la labortago estas eble ne la sola metodo por pliigi produktadon. La germana registaro, akceptante la neceson rajtigi aldonajn laborhorojn, zorgis konservi netuŝita, en la lasttempa ordono pri laborhoroj, la principon de la okhora tago. Kiam Germanlando reakiros ĝian ekonomian ekvilibron, ĝi reiros al normaj kondiĉoj pri laborhoroj.

La franca laborista reprezentanto deklaris, ke la Administra Konsilantaro ne povas aprobi la doktrinon de la franca kaj germana mastraj delegitoj kaj akcepti la rajton de unu nacio sin meti ekster la ĝenerala regulo pri laborhoroj. La demando pri rebonigoj estas demando grave interesanta ĉiun Francon, al kiu ajn socia klaso li apartenas. La francaj laboristoj forte apogis ĉiun klopodon por solvi la problemon de la rebonigoj kaj restarigi pacon en Eŭropo. Ili tamen kontraŭstaras ĉiun klopodon kunigi la pagon de rebonigoj kun la plidaŭrigi de laborhoroj en Germanlando. Ili tion kontraŭstaras despli, ĉar ili kredas, ke plidaŭrigo de laborhoroj ne rezultigas pliigon de produktado.

En la hodiaŭaj cirkonstancoj la vero estas tute kontraŭa. La tasko de la Internacia Labora Oficejo estas klara: rapidigi, kun ĉiuj ĝiaj energioj, la konfirmon de la Washingtona okhora konvencio.

La reprezentantino de la brita registaro, kvankam certigante, ke la laborista Registaro de Granda Britlando ne preterlasas la problemon de rebonigoj, insistis pri la internacia graveco de la laborhora demando. La nuna Ministro de Laboro, kiu estis Prezidanto de la Okhora Komisiono de la Washingtona Konferenco, ĉion faros por efiki la samtempan aplikon de la okhora

tago en ĉiuj landoj. La sperto en Granda Britlando pruvis, ke longaj laborhoroj ne pliigas produktadon. Pro tiu motivo, ŝi ne povis iumaniere aliĝi al la ideo, ke la plidaŭrigo de laborhoroj kaj la pago de rebonigoj estas nedisigeblaj demandoj.

Resumante la diskutadon, la Direktoro de la Internacia Labora Oficejo rimarkigis la grandan gravecon de la diroj de la registara, mastra kaj laborista reprezentantoj de Germanlando, rilate al ilia komuna volo pri la pago de rebonigoj. Tiuj diroj signas novan stacion sur la vojo al ekonomia paco. La Direktoro ankaŭ notis la deklarojn de la germanaj registara kaj mastra reprezentantoj pri la esence kelkatempa karaktero de la plidaŭrigo de laborhoroj en Germanlando. Samtempe, neniu povas proponi, ke la Internacia Labora Oficejo konsentu al foriro el la limoj fiksitaj en la Washingtona Konvencio. Kiel oni jam sugestiis, estas eble certigi pli bonan produktadon sen plidaŭrigo de laborhoroj. Finfine, kaj precipe, oni deziras garantion, ke la antaŭvidita pliigo de produkto en Germanlando estos efektive utiligata por la pago de rebonigoj, ke la germanaj laborantoj ne estos la solaj personoj en Germanlando kiuj portos la ŝarĝon, kaj ke ili ne troviĝos farintaj oferon, kiu, el la vidpunkto de la tutmonda paco, estos senutila. Se ĉiuj ŝtatoj jam konfirmis la Konvencion, ne ekzistus maltrankvilo pri tio. En tiaj cirkonstancoj, eble Germanlando alvokus Art. 14 de la Konvencio, artikolo permesanta esceptom de la ĝeneralaj kondiĉoj „okaze de milito aŭ alia okazintaĵo minacanta la nacian sendanĝerecon". En tiu okazo, la ceteraj ŝtatoj devus kaj povus ekzameni la kondiĉojn de tiu escepto. La diskutado, aldonis la direktoro, montras pli klare ol iam, la valoron de regula kaj plena funkciado de la Internacia Labora Organizaĵo kaj la neceson daŭrigi energie la laboron por certigi konfirmojn. Al tiu tasko la Direktoro sin donos fervore kaj senĉese, fortigita de la unuanima apogo de la Administra Konsilantaro.

Ĉe la fino de la diskutado, la Konsilantaro voĉdonis, sen malkonsenta voĉo, rezolucion komisiantan al la Direktoro daŭrigi liajn klopodojn por havigi konfirmojn de la diversaj Konvencioj de la Internacia Labora Organizaĵo, kaj altiri ĝeneralan atenton al tiuj konvencioj, per taŭgaj eldonaĵoj klarigantaj la motivojn kiuj inspiris ilin, kaj per la disdono de ĉiuj haveblaj informoj pri la sperto jam farita rezulte de la apliko de tiuj konvencioj.

La Administra Konsilantaro decidis, ke la jenaj demandoj estu metitaj en la tagordon de la Kunsido de la Internacia Labora Konferenco en 1925:

1. Ĝenerala Raporto pri Socia Asekuro;
2. Kompenspago por laborakcidentoj.

---

## La enketo pri produktado.

La dua volumo de la Raporto pri la Enketo pri Produktado, enketo farita de la Internacia Labora Oficejo, ĵus aperis. Tiu ĉi volumo koncernas la parton de la enketo rilatan al la ĝenerala movado de produktado depost la antaŭmilita epoko ĝis 1921 aŭ 1922 kaj la responda movado de la media produkto laŭ laboranto. La du sekvontaj volumoj koncernos la kaŭzojn de la krizo kaj la proponitajn rimedojn kaj faritajn eksperimentojn.

La dua volumo enhavas 1356 paĝojn, kune kun 665 tabeloj kaj 330 diagramoj. Preskaŭ mil paĝoj necesiĝas por la ekzameno de la ĝenerala movado. Tiu ekzameno ampleksas plurajn artikolojn klasitajn sub la jenaj rubrikoj: mineraloj, brutaĵoj, minaĵoj kaj metaloj, ĥemiaj produktaĵoj, agrikulturaj produktaĵoj destinitaj al industrio, agrikulturaj produktaĵoj destinitaj al nutro, agrikulturiloj, manufakturaj industrioj, konstruado.

La komparoj faritaj estas bazitaj sur statistikaj donitaĵoj rilataj al la diversaj landoj, donitaĵoj eldonitaj en la raporto. La metodo sekvita por tiuj komparoj estas la jena: oni indikas unue la ĝeneralan movadon de produkto dum la tuta periodo pritraktata kaj poste sekvas la movado en ĉiu el la jenaj kvar grupoj da landoj: militintaj landoj en Centra kaj Orienta Eŭropo; militintaj landoj en Okcidenta Eŭropo; neŭtralaj eŭropaj landoj; eksterеŭropaj landoj. Fine oni klopodas indiki la ŝanĝojn okazintajn en ĉiu lando.

La objektoj konsideritaj ampleksas la jenajn: karbo, oleo, fero, kupro, plumbo, zinko, aluminio, hidrargo, arĝento, oro, sterkoj, sulfuro, kaŭĉuko, kotono, lano, silko, tolo, kanabo, ĵuto, beto, kansukero, sukero, tritiko, sekalo, maizo, rizo kaj ŝipoj.

La parto de la libro pritraktanta produkton laŭ laboranto dividiĝas en tri sekcioj, kiuj respektive koncernas: problemojn pri metodo; produkton laŭ laboranto en diversaj landoj; aldonajn informojn pri produkto en agrikulturo.

---

## La Sepa Kunsido de la Internacia Labora Konferenco.

La Direktoro de la Internacia Labora Oficejo sendis al la Registaroj de la 57 Ŝtatmembroj de la Internacia Labora Organizaĵo leteron sciigantan ilin, ke la Sepa Kunsido de la Internacia Labora Konferenco okazos la 16an de junio 1924 en Genève.

La Tagordo de la Konferenco konsistos el la jenaj kvar demandoj:

1. Disvolvigo de facilaĵoj por la utiligo de la libertempo de laboristoj;
2. Egaleco de traktado por naciaj kaj eksterlandaj laboristoj pri kompenspago por akcidentoj;
3. Semajna interrompo de laboro dum 24 horoj en vitrofabrikejoj uzantaj basenfornegojn;
4. Nokta laboro en bakejoj.

Tiu kunsido de la Konferenco ankaŭ traktos plurajn demandojn koncernantajn la ĝeneralan agadon de la Internacia Labora Organizaĵo, kiuj ne necesigas la voĉdonon de Projektoj de Konvencioj aŭ de Rekomendoj.

Unue, la Konferenco devas noti la raporton, kiun la Oficejo estis komisiita prezenti al la Registaroj pri la demando rilata al la proceduro por la modifo de Konvencioj.

Due, la Konferenco devos ekzameni la raporton de la Konsila Komitato pri Karbunkolo, kiun raporton la Administra Konsilantaro decidis transmeti al la sesa Kunsido de la Konferenco, por ke ĝi konsideru kiujn rimedojn konvenas proponi por efektivigi la konkludojn atingitajn de la Komitato en Decembro 1922.

La Konferenco ankaŭ ricevos la Raporton de la Direktoro de la Internacia Labora Oficejo. Tiu Raporto enhavos ĝeneralan studon pri la funkciado kaj agado de la Oficejo de Julio 1922 ĝis la 31a de Decembro 1923 kaj ankaŭ de la aranĝoj faritaj de la Ŝtatmembroj de la Organizaĵo por efektivigi la projektojn de Konvencioj kaj la Rekomendojn balotitajn de antaŭaj Kunsidoj de la Konferenco.

Finfine, estos prezentata al la Konferenco Raporto pri Senlaboreco, konstatanta la rezultatojn de la esploroj pri tiu problemo, kiujn la Oficejo estis komisiita entrepreni, kaj ankaŭ raporto pri la demando proponita de la Kvara Kunsido al la Oficejo, pri la vivnivelo en la landoj kun grava malpliigita valuto.

---

## La Senlaboruloj de la Mondo. Statistikoj de la Internacia Labora Oficejo.

Ciferoj montrantaj la tutmondan situacion pri senlaboreco aperis en la decembra numero de la „Internacia Labora Revuo".

Laŭ tiuj ciferoj, estas evidente, ke neniu ŝanĝo okazis en la ĝenerala situacio dum septembro kaj oktobro 1923, escepte en Germanlando. Tie senlaboreco atingis grandecon ĝis nun nekonatan en tiu lando. Ĉirkaŭ 10 procentoj el la kvin milionoj de la-

boristoj ampleksitaj de la raportoj estis senlaboraj, kaj preskaŭ 40 procentoj laboris nur parttempe.

Kontraŭe al ĉio, kio okazis en Germanlando, senlaboreco malpliiĝis en Ĉeĥoslovakio, Aŭstrio kaj Pollando. En Pollando pliiĝo de okupado estas konstatita en la metala, papera, konstrua, maŝinfabrika, librobinda kaj ĥemia industrioj. En Aŭstrio senlaboreco malpliiĝis ĉe konstruaj, vestaĵaj kaj metalaj laboristoj.

En Usono malgranda malpliiĝo de okupado montriĝis, precipe en la veturila industrio kaj ĉe la manufakturo de kaŭĉuko, botoj kaj ŝuoj, aŭtomobilaj radringoj kaj agrikulturiloj.

---

## Simpligo de la dungo de sezona eksterlanda laboristaro.

Interesa sistemo enkondukiĝis en Franclando por simpligi la redungon de sezona eksterlanda laboristaro. Antaŭe la redungo printempe de fremdaj laboristoj por sezonaj industrioj, kiuj preskaŭ ĉesas dum la vintro, necesigis longajn kaj komplikitajn formalaĵojn.

Por eviti la prokraston kaj elspezon tiel kaŭzitaj, aranĝoj fariĝis por ebligi al konstruistoj kaj entreprenistoj de publikaj laboroj, anstataŭ maldungi sezonajn laboristojn, hejmsendi ilin forpermese

Oni uzas tiacele formulojn, kiuj atestas, ke la koncernata laboristo estis okupata dum la sezono de difinita jaro, kaj ke la mastro estas preta por redungi lin la proksiman sezonon, se li prezentiĝos por labori, kiam li ricevos la ordonon sendotan al li, kaj plej malfrue la 13an de aprilo. Tiu formulo estas donata al la laboristo, samtempe kun liaj legitimaĵoj, kaj servas kiel pasporto. Por reeniri en Franclandon, li devas nur montri tiujn paperojn, kune kun la letero de lia mastro invitante lin rekomenci la laboron.

La sistemo proviĝis lastan jaron pri italaj laboristoj, kaj tiun ĉi jaron oni etendos ĝin al ĉiunaciuloj.

---

## Pollando kaj la Internacia Labora Organizaĵo.

Laŭ informoj ricevitaj de la Internacia Labora Oficejo, la Pola Deputitaro, ĉe ĝia kunsido la 4an de Decembro 1923, rajtigis la konfirmon de ne malpli ol 13 Projektoj de Konvencioj de la Internacia Labora Konferenco.

Inter la Projektoj de Konvencioj tiel konfirmitaj, estas tiuj pri senlaboreco, pri la minimuma aĝo por allasi infanojn al industria laboro kaj pri nokta laboro de virinoj en industrio, konvencioj balotitaj en la Unua Kunsido de la Konferenco en Washington

La sep Projektoj de Konvencioj balotitaj en la 1921 Kunsido de la Konferenco estas ĉiuj konfirmitaj. Tiuj ampleksas, krom la gravaj Konvencioj pri la aĝo por allasi infanojn al agrikultura laboro, pri la rajto je asociado kaj unuigo de la kamplaboristoj kaj pri kompenspago por akcidentoj al kamplaboristoj, ankaŭ la Projektojn de Konvencioj pri semajna tagripozo en industriaj entreprenoj kaj pri la uzo de plumboblanko en pentrado.

---

## La Internacia Labora Oficejo kaj la maraj laborkondiĉoj. La klopodado de la Komuna Mara Komisiono.

Unu el la gravaj demandoj diskutataj de la Administra Konsilantaro de la Internacia Labora Oficejo en ĝia kunsido komencinta la 29an de Januaro, estas la Raporto pri la Tria Kunsido de la Komuna Mara Komisiono, kiu kunvenis lasttempe en Londono. Tiu Komisiono estis starigita de la Internacia Labora Konferenco en ĝia Kunsido en Genova en 1920, kaj estas interese konstati, ke, en sia lasttempa kunsido, malgraŭ la malfacilaj cirkonstancoj ankoraŭ kontraŭstarantaj la maran industrion, ŝipposedantoj kaj maristoj certigas sian decidon daŭre servi komune, en la Komuna Mara Komisiono, solvojn, kiuj ebligus la Internacian Laboran Organizaĵon plibonigi la situacion de la maristoj.

Rilate al informoj prezentitaj de la Internacia Laboro Oficejo pri la aranĝoj faritaj aŭ proponitaj de diversaj Registaroj por la starigo de naciaj maristaj statutoj, la Komisiono rekomendis, ke la Oficejo entreprenu la eldonon de sistema kolekto de la leĝoj ekzistantaj en la diversaj landoj. Ĝi esprimis la opinion, ke tia verko estus treege utila por la preparo kaj diskutado de Internacia Marista Statuto, kaj ke ĝi ankaŭ havus grandan praktikan valoron por la maraj interesatoj.

---

## Tutmonda prezaltiĝo.

Ciferoj aperintaj en la decembra numero de la „Internacia Labora Revuo" montras ĝeneralan plialtiĝon de prezoj en la tuta mondo.

Laŭ tiuj ciferoj, pograndaj prezoj havas pli malpli difinitan altiĝan movadon en la plejmulto el la landoj. Tiuj landoj povas dividiĝi je du grupoj. La unua grupo ampleksas Germanlandon, Ruslandon kaj Pollandon. Tie la movado rezultas el la ĝenerala ekonomia situacio kaj la malaltiĝitaj valutoj, kaj la prezoj estas konstante plialtiĝintaj dum pluraj monatoj. La dua grupo ampleksas Hispanlandon, Usonon, Hindion, Norveglandon, Nederlandon kaj Novan Zelandon. Tie la situacio ne fariĝas percepteble malpli bona. kaj la prezmovado estas pli ŝanceliĝa ol konstante plialtiĝa.

En Germanlando la pograndaj prezoj daŭras plialtiĝantaj rapide. Rimarkinda cirkonstanco en la lastaj tempoj estas, ke la pograndaj prezoj plialtiĝis eĉ pli ol la dolarvaluto, tiel ke la prezoj de tre multaj fabrikaĵoj estas pli altaj ol la mondprezoj. Je la komenco de oktobro, la orvaloro reprezentita de la indeksaj ciferoj de la „Frankfurter Zeitung" estis, por la mineralaj produktoj, la duoblo, kaj por la teksaĵoj unu kaj duono, de la antaŭmilitaj prezoj. Nur la nutraĵprezoj estas ankoraŭ malpli altaj ol la mondprezoj.

Pri pomalgrandaj prezoj estas sentebla plialtiĝo en Germanlando, Ruslando, Pollando, Aŭstrio kaj Hungarlando. Pli malgranda altiĝo montriĝas en Belglando, Franclando, Finnlando, Italio, la Unuigita Regno kaj Usono; en Sudafriko kaj Hispanlando la prezoj estas senmovaj, kaj en Egipto, Norveglando kaj Luksemburglando ili estas malaltiĝantaj.

En Germanlando la dirito pri pograndaj prezoj estas ankaŭ vera pri la vivkosto, ĉar la ŝanĝoj de la pograndaj prezoj speguliĝas en la pomalgrandaj en unu semajno.

La prezoj restas firmaj en la transoceanaj landoj: Kanado Usono, Sudafriko, Aŭstralio kaj Nova Zelando, kun malgrandiĝa tendenco en Nova Zelando. La lasta cirkonstanco rezultas verŝajne el la importado de viando el Aŭstralio.

---

## Asekuro kontraŭ senlaboreco. Novaj Projektoj en diversaj landoj.

En multe da landoj la socia neceso pagi kompenson dum senvola senlaboreco, kompreniĝis la unuan fojon nur ĉe la ondoj de senlaboreco, kiuj aperis je la komenco de la Mondmilito kaj post la Militpaŭzo. En tiuj epokoj, la Registaroj de pluraj landoj, kie asekuro kontraŭ senlaboreco aŭ tute ne ekzistis, aŭ ekzistis nur kun nesufiĉa amplekso, starigis sistemojn de monhelpo por senlaboruloj. Tiuj sistemoj estis subtenataj el publika mono, sed estis klare distingataj de la ordinaraj sistemoj por la helpo de malriĉuloj, kaj estis bazitaj sur la ideo de kompenspago.

Depost la Militpaŭzo, la vera asekuro kontraŭ senlaboreco iom post iom reakiris ĝian gravecon en la landoj, kie ĝi jam ekzistis, kaj estas starigita en aliaj landoj.

En Granda Britlando kaj Irlando, deviga asekuro kontraŭ senlaboreco estas etendita al ĉiuj profesioj, krom agrikulturo kaj domservo, kaj nun ampleksas ĉirkaŭ dekdu milionoj da laboristoj. Deviga asekuro estas starigita en Aŭstrio kaj Italio, kaj tiacela projekto estas proponita de la Germana Registaro.

La rimarkinda fakto en la plejmulto el la landoj, kie asekuro jam ekzistis, estas, ke la vasteco de senlaboreco depost 1921 necesigis rimedojn por alplenigi la nesufiĉajn kompensojn pagatajn de la asekuraj institucioj. Tiaj estas la „nekontraktitaj pagoj" („unconvenanteg benefits") en Granda Britlando, la Urĝa Kaso en Belglando, similaj aranĝoj en Nederlando, kaj la provizora daŭrigo de helpsistemo, kune la asekura sistemo, en Italio.

Nova fazo ŝajnas esti komencita dum la lastaj monatoj. La ondo de senlaboreco ĉesis en iuj landoj kaj dekreskis en aliaj, kaj ĝenerala politiko celanta limigon de publikaj elspezoj montriĝas ĉie. Rezultas klopodoj por reveni al normaj kondiĉoj pri asekuro, malpliigante aŭ forigante la alplenigajn pagojn de la ŝtato. Lasttempaj disvolviĝoj laŭ tiu direkto en diversaj landoj estas priskribitaj en la decembra numero de la „Internacia Labora Revuo".

## Laboraj Juĝistaroj en Ĉeĥoslovakio.

Leĝprojekto estas preparata en la Ĉeĥoslovaka Ministrejo de Justeco por etendi la povojn de la Industriaj Juĝistaroj. Tiu ĉi estos nomataj Laboraj Juĝistaroj, kaj traktos ĉiuspecajn disputojn inter mastroj kaj laboristoj okaze de okupado.

Oni proponas starigi Laborajn Juĝistarojn en ĉiuj lokoj, kie ili estas necesaj. Ili konsistos el Prezidanto kaj anstataŭanto, kiuj estos profesiaj juĝistoj, kune kun iuj asesoroj, unu duono mastroj kaj alia duono laboristoj.

La Laboraj Juĝistaroj estos kompetentaj por trakti ĉiujn disputojn rilatajn al la jenaj demandoj: Deprenoj el salajroj, monpunoj ktp.; demandoj pri pensioj kaj aliaj monhelpoj; eldono kaj enhavo de atestaĵoj pri servado, rekomendaĵoj ktp.; demandoj pri luĉeso kaj luprezoj de loĝejoj luigitaj de mastroj al laboristoj; disputoj inter laboristoj pri laboroj entreprenitaj komune.

[illegible] Magdeburg-N